Manfred Hausmann,

Al la amiko

tradukita de Manfred Retzlaff

Mi pensas daŭre nur pri ci, amik'.
Malvarmas tiu nokto de aŭtun'.
Kun kap' klinita foje staras mi.
Abi-konusoj fore falas en arbar'.

Postaŭdas tiun sonon longe mi.
Mi frostas kaj memoras mi pri vers'.
Mi pensas, ke maldormas ci. Ĉu ne?
Ĉu estas same maltrankvila ci?

Traduko de la Germana poemo "Dem Freunde" de MANFRED HAUSMANN *(∗1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04).*

Arg-915-1833 (2013-07-31 17:00:32)